## EKO 2014-52 sendita el la 31a de decembro 2014.

# Impulsoj de paralela AMO 8

AMO amokas plu – per AM-oko. Pri lundo ni jam raportis, en la JESa Weiβwasser marde gvidis Petro Balaž pri la temo 'Informado' subaze de du lumbildaj prezentaĵoj kaj praktika ekzerco. En posta komuniko ni disponigos al vi tiujn prezentaĵojn. Li traktis plej diversajn formojn de informado – starigo de budo en aranĝo, en urba placo, kun praktikaj konsiloj pri la necesaj preparaĵoj kaj potencialaj obstakloj. Li montris, kiel plej diversaj informfakoj povas sinergie funkcii – kontakloj kun ĵurnalistoj, bonaj kaj rekomendeblaj retejoj, malfermiteco de renkontiĝoj kaj multo pli.

La merkredan programon malfermis Nico Huurman, la kasisto de TEJO. Li tre klare montris la rolojn de spezkontoj kaj bilancoj ene de la par-enskriba librotena sistemo. Ne temo por amasa interesiĝo, sed ene de nia komunumo estas granda bezono de kapabluloj, unuavice por fariĝi kasistoj, sed pli vaste, ke agemuloj komprenu la bezonon por financa mastrumado kaj planado.

La dua merkreda prezentanto estis novulo al AMO: Judith Meyer el Berlino, kiu parolis pri la novaj ebloj de la pli interaktiva kaj egaleca reto 2.0, kiu jam ekzistas kaj floras. Ŝia lumbilda programo prezentis vastan panoramon pri la abundaj ebloj kaj programoj por komuna planado, diskutado, informado, kune kun konsiloj kiel pretigi materialojn kiuj kapablos kapti atenton en tiu multoferta kaj inunda inform-ĝangalo. Ni disponigos ankaŭ tiun prezentaĵon en posta komuniko.

# Gazetara reeĥo el AMO 7
# – ili praktikis kion ili predikis

Nacia gazeta informagentejo (ATOP) raportis pri la sepa AMO-seminario de UEA, kiu ĵus okazis sub la organizo de la Afrika Komisiono de UEA – en Lomeo, Togolando, de la 26a ĝis la 29a de decembro 2014. Seminaria enhavo predikis la gravecon de informado – jen la praktika realigo de tiu konsilo.

Aldone al la jam dissendita teksto, ili raportas: "Tiu unua Afrika seminario arigis entute 29 partoprenantojn po 4 el Benino, 2 el Ebura Bordo, 2 el Niĝerlando, 1 Svislando kaj 20 el anguloj de Togolando. La aranĝo estis pli ol sukcesa…". La aldona PDF prezentas tri fotojn el la aranĝo: la unua (la grupfoto) estas tiu uzita en la komuniko de ATOP. La PDF krome prezentas la titolpaĝon de la komuniko de ATOP, kune kun la du paĝoj, kiuj enhavas la raporton pri la seminario.

Jen do informoj el du preskaŭ paralelaj seminarioj: la sepa kaj la oka.

> En AMO, festas ni, Ek! Sep-oka
> Sen AMO restas vi - eks-epoka

Stefan MacGill
Vicprezidanto de UEA

PS: mi malfruas jam plurajn horojn deziri al vi agrablan nov-zelandan novjaron! Se vi festas jarŝanĝon iam en la sekvaj 22 horoj, ĉion bonan por 2015, kun multe da produktiva kunlaboro!

Vortoj: 439.  LA cirk 2014-12-31 AMO 7 kaj 8 teksto.docx
Aldonaĵo: PDF-versio de AMO-7 kun tri fotoj kaj ekstraktoj el la franclingva novaĵagenteja raporto.
Aldonita al vikio, apr 27 2015